# フランスの友人が来ます　よろしく！

Ĝoja sciigo. De la 1-a ĝis la 5-a de oktobro ĉijara ni akceptos gastojn el Francio. Ili estas gesinjoroj Senecal, ĉirkaŭ 65 aĝaj Normandianoj. Ili jam vizitis nin antaŭ 5 jaroj. Tiam ili travojaĝis tra Japanio de sudo al nordo sekvante sakurflorojn, sed ĉi-foje planas postkuri ruĝiĝantajn foliojn mondfame belegajn.

Gesinjoroj Senecal estas tre agrablaj kaj spertovolemaj homoj. Tre plaĉas al ili japana lando. Ili multe interesiĝas al diversflankoj de Japanio: al la kutimoj, la manĝaĵoj, la pejzaĵoj, la popoloj (Japanoj kaj Ainoj) ktp.

Hazarde ĝuste tiam okazos en *Kaderu 2·7* la kongreso de hokkajdaj esperantistoj. Tio estos bonŝanco por ni praktiki esperanton kun alilandaj esperantistoj. Malofta ŝanco por ni.

B.v. helpi min bonvenigante kaj akompanante ilin. Prove gastigu kaj tranoktigu ilin. Se vi povos fariĝi gastiganto, senĝene sinprezentu al la estro de SES. Amikiĝi kun alilandanoj estus briligi vian vivon.

山岸悦子

Kirikae H. skribas: Mi atendas vian kontakton. Mi mem jam promesis al Ecuko bonvenigi ilin la 2-an kaj 3-an.